



Universala Esperanto-Asocio

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Neregistara organizo en konsultaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Kvarjara Raporto (2022-2025) al la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN (EKOSOK)

A. Kontribuo de la organizo al la laboro de Unuiĝintaj Nacioj

1. La Novjorka Oficejo de UEA ĉe 777 UN Plaza prizorgas la kunlaboron kun UN, kunordigas volontulojn en Novjorko, Ĝenevo kaj Vieno, kaj publikigas dumonatan bultenon en Esperanto, la angla kaj la franca pri sia laboro ĉe UN.
2. La ĉiujaraj kongresoj de UEA subtenas la celojn kaj prioritatojn de UN kaj Unesko: *Lingvo, vivo, tero: La Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj* (Montrealo, Kanado 2022); *Enmigrado: kunfluo de homaj valoroj* (Torino, Italio 2023); *Homo, lingvo kaj medio por pli bona mondo* (Aruŝo, Tanzanio 2024); *Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj* (Brno, Ĉeĥio 2025). La Virtuala Esperanto-Kongreso, lanĉita en 2020 responde al la pandemio de KOVIM-19, fariĝis regula reta evento organizata de UEA, por certigi pli grandan alireblecon kaj median daŭripovon.
3. UEA deĵoris dum du periodoj kiel estrarano de la Konferenco de Neregistaraj Organizoj (CoNGO) de 2020 ĝis 2026, kaj aktivas en (interalie) ĝiaj Komitatoj pri Edukado (Novjorko), Paco (Vieno), kaj en ĝia nova NRO-Komitato pri Lingvoj kaj Lingvaĵo (CoLL), fondita danke al la gvidado de UEA, kun UEA kiel ĝia unua prezidanto. Parolanto ĉe la fondkunveno de CoLL en 2021 estis la Vica Ĝenerala Sekretario de UN, Movses Abelian, en sia rolo kiel kunordiganto de UN pri multlingvismo. En CoLL aktivas la Internacia Federacio de Tradukistoj (FIT) kaj la Internacia Asocio de Konferencaj Interpretistoj (AIIC) kaj ĉirkaŭ dudek pliaj NRO-oj.
4. UEA publikigas deklarojn okaze de UN-observotagoj, kiuj kondukas al artikoloj en la gazetaro, Esperanto-parolanta radio, la revuo de la Asocio *Esperanto*, kaj sociaj retoj – kaj al agorientitaj eventoj en Esperanto.
5. Por eduki la Esperanto-parolantan publikon, UEA funkciigas filian strukturon, kiu disvastigas la mesaĝon de UN kaj instigas subtenajn agadojn loke kaj nacie. Ĝia retejo www.esperantoporun.org enhavas enkondukon al UN, tradukojn de UN-dokumentoj, starpunktojn pri la Celoj por Daŭripova Evoluigo, ktp. Ĝi estas vaste uzata de la Esperanto-komunumo.
6. UEA helpis fondi la Studgrupon pri Lingvoj kaj UN, kiu organizas ĉiujarajn simpoziojn pri la lingva politiko kaj praktiko de UN kaj pri la interrilato inter UN kaj civila socio. Partoprenataj de akademiuloj, UN-oficialuloj kaj NRO-oj, la simpozioj estas kunsponsorataj de organizoj kiel la Centro por Aplikata Lingvistiko (Vaŝingtono), Birkbeck, Universitato de Londono, kaj la Esperantic Studies Foundation (ESF). Lastatempaj temoj: Multlingvismo kaj COVID-19: Lernitaj

lecionoj kaj rigardo antaŭen; Lingvaj rajtoj por paco, justeco kaj fortaj institucioj;
Geopolitika malstabileco kaj la valoro de multlingvismo.

B. Partopreno en kunvenoj de Unuiĝintaj Nacioj

En 2022, UEA:

Februaro – Submetis skriban konsultdeklaron por la Partnereca Forumo de EKOSOK.

Marto – Partoprenis ĉeeste en la Konsulta Kunveno de la Prezidanto de la Ĝenerala Asembleo pri Plifortigita Internacia Kunlaboro, kaj faris intervenon.

Majo – Partoprenis ĉeeste en la Dialogo kun la Kandidato por Prezidanto de la Ĝenerala Asembleo por la 77-a sesio, kaj faris intervenon.

Majo – Kiel prezidanto de la Substanca Komitato de CoNGO pri Lingvo kaj Lingvoj, gastigis dialogforumon pri multlingvismaj iniciatoj kun gvidantoj de Unesko.

Majo – Kunlabore kun la Studgrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, okazigis simpozion kun la temo Multlingvismo kaj COVID-19: Lernitaj lecionoj kaj rigardo antaŭen, kiu inkluzivis s-ron Maher Nasser de la Divizio pri Atingado de la Departemento de Tutmonda Komunikado de UN kiel ĉefparolanton.

Julio – Kunlabore kun la Konstanta Misio de Hispanio ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj la NRO-Komitato pri Lingvoj kaj Lingvaĵo, okazigis flankan eventon de la Altnivela Politika Forumo pri Celo 4 por Daŭripova Evoluigo kaj multlingva edukado.

Septembro – Partoprenis ĉeeste en la altnivela kunveno de la 77-a sesio de la Ĝenerala Asembleo por marki la tridekan datrevenon de la adopto de la Deklaracio pri la Rajtoj de Personoj Apartenantaj al Naciaj aŭ Etnaj, Religiaj kaj Lingvaj Minoritatoj.

Novembro – Kiel prezidanto de la Substanca Komitato de CoNGO pri Lingvoj kaj Lingvaĵo, gastigis dialogforumon pri lingvaj rajtoj kun la Speciala Raportisto pri Minoritataj Aferoj.

En 2023, UEA:

Februaro – Partoprenis ĉeeste en la Neformala Kunveno kun Civila Socio, organizita de la Tria Komitato de la Ĝenerala Asembleo, kaj faris intervenon.

Aprilo – Kiel prezidanto de la Substanca Komitato de CoNGO pri Lingvoj kaj Lingvaĵo kaj kunlabore kun la Internacia Asocio de Konferencaj Interpretistoj kaj la Internacia Federacio de Tradukistoj, gastigis kunvenon pri novaj horizontoj en traduka kaj interpreta teknologio.

Junio – Kunlabore kun la Konstantaj Misioj de Andoro, Burundo, Kanado, Ĝibutio, Ekvatora Gvineo, Hispanio, la Internacia Organizo de Frankofonio, la Studgrupo pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj, kaj la NRO-Komisiono pri Lingvo kaj Lingvoj, okazigis specialan teman sesion pri Multlingvismo tra la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj kun la Prezidanto de la Ĝenerala Asembleo kaj aliaj altrangaj UN-gvidantoj.

Decembro – Kiel prezidanto de la Substanca Komitato de CoNGO pri Lingvoj kaj Lingvaĵo, gastigis dialogforumon pri lingvoj kaj homaj rajtoj kun profesoro Robert Phillipson.

En 2024, UEA:

Januaro – Partoprenis ĉeeste en la 5-a Plena Kunveno de EKOSOK– Kunordiga Segmento –kaj faris intervenon.

Majo – Kontribuis al la deklaro de la Ĉefgrupo de NROj por la Altnivela Politika Forumo.
 Majo – Kiel prezidanto de la Substanca Komitato de CoNGO pri Lingvoj kaj Lingvaĵo, okazigis specialan informkunvenon pri lingvaj servoj kaj Eŭropa Unio.
 Junio – Kunlabore kun la Studgrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, okazigis simpozion kun la temo Lingvaj rajtoj por paco, justeco kaj fortaj institucioj.
 Julio – Kunlabore kun SIL International kaj la NRO-Komisiono pri Lingvoj kaj Lingvaĵo, okazigis flankan eventon de la Altnivela Politika Forumo pri Celo 16 por Daŭripova Evoluigo kaj la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj.
 Septembro – Submetis skriban deklaron pri la Pakto por la Estonteco.

En 2025, UEA:

Januaro – Kiel prezidanto de la Substanca Komitato de CoNGO pri Lingvoj kaj Lingvaĵo, gastigis rondtablan diskuton pri indiĝenaj lingvaj rajtoj, kunpartopreno de la estro de la Sekcio pri Indiĝenaj Popoloj kaj Minoritatoj de la Oficejo de la Alta Komisaro de UN pri Homaj Rajtoj.
 Junio – Kunlabore kun la Studgrupo pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, okazigis simpozion kun la temo Geopolitika malstabileco kaj la valoro de multlingvismo, kiu inkluzivis s-inon Mita Hosali, vicdirektoron de la Divizio pri Novaĵoj kaj Amaskomunikiloj de Unuiĝintaj Nacioj, kiel paneliston.
 Septembro – Kiel prezidanto de la Substanca Komitato de CoNGO pri Lingvoj kaj Lingvaĵo, faris intervenon ĉe la lanĉa ceremonio de la Grupo de Amikoj de Multlingvismo.
 Septembro – Kiel prezidanto de la Substanca Komitato de CoNGO pri Lingvoj kaj Lingvaĵo, okazigis informkunvenon kun la Oficejo de la Prezidanto de la Ĝenerala Asembleo pri iniciatoj de la Prezidanto de la 79-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj por la antaŭenigo de multlingvismo.

Tiuj eventoj kunigis UN-funkciulojn, akademiulojn, tradukistojn, interpretistojn kaj reprezentantojn de civila socio por antaŭenigi dialogon pri multlingvismo, lingvaj rajtoj kaj inkluziva partopreno.

C. Kunlaboro kun organoj de Unuiĝintaj Nacioj

1. UEA regule kontribuas per starpunkto-dokumentoj kaj mesaĝoj pri aferoj rilataj al la prioritatoj de EKOSOK, inkluzive de daŭripova evoluigo, lingvaj rajtoj, diskriminacio kaj aliaj koncernaj temoj, kaj al Unesko.
2. La eldonaĵo de UEA *Fundamento de la homaj rajtoj* enhavas tradukojn de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj aliaj instrumentoj pri civilaj rajtoj.
3. La114-paĝa Gvidilo al Daŭripova Evoluigo, unue eldonita de UEA en 2020, subtenas edukadon pri la Tagordo 2030 ene de la Esperanto-parolanta komunumo. Verkita de Esperanto-parolantaj fakuloj pri temoj rilataj al ĉiu Celo por Daŭripova Evoluigo, la gvidilo proponas praktikajn rekomendojn por integri daŭripovajn kutimojn en ĉiutagan vivon.
4. UEA kunlaboras kun la Departemento de Tutmonda Komunikado, inkluzive de ĝia NRO-branĉo, kaj ĉeestas informkunvenojn en Vieno, Ĝenevo kaj Novjorko.

D. Iniciatoj de la organizo por subteni la Jarmilajn Evoluigajn Celojn / Celojn por Daŭripova Evoluigo

UEA sindediĉas al la antaŭenigo de la celoj de UN kaj de la Tagordo 2030 per promociado de lingvaj homaj rajtoj, justa komunikado kaj interkultura kompreniĝo. Ĝia tutmonda reto kaj iniciatoj subtenas precipe la Celojn por Daŭripova Evoluigo 4, 10, 16 kaj 17: inkluzivan edukadon, reduktion de malegalecoj, kreskigon de paca dialogo, kaj plifortigon de paca internacia kunlaboro. Ĝi asertas, ke lingva justeco estas necesa por atingi la Tagordon 2030 por Daŭripova Evoluigo, ĉar ĝi ebligas aliron al edukado, partopreno, rajtoj kaj internacia kunlaboro.

Celo 4 por Daŭripova Evoluigo – Bonkvalita Edukado

UEA:

- subtenis inkluzivan kaj multlingvan edukadon per tutmondaj kaj retaj iniciatoj, kune kun sia filiigita organizo de Esperanto-parolantaj instruistoj (ILEI);
- monitoris kaj diskonigis sciencan esploradon kaj interfakan edukadon pri lingva egaleco, por siaj membroj en 70 landoj kaj pliaj partoprenantoj tutmonde pere de:
 - a) sia ĉiujara Internacia Kongresa Universitato; kaj
 - b) sia en Kanado bazita Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj;
- organizis kaj kunordigis lingvokursojn, ekzamenojn kaj Erasmus+-projektojn pri interkultura kompetento kaj aliaj edukaj temoj;
- ofertis libere alireblajn publikaĵojn kaj ciferecajn lernrimedojn, kiuj antaŭenigas justan aliron al edukado sendepende de lingva fono;
- kontribuis al la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj, aparte per sia Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo en 2022;
- publikigis en Esperanto la Unesko-volumon *Kio igas nin homaj*, konsciigante pri lingva diverseco.

Celo 10 por Daŭripova Evoluigo – Redukti Malegalecojn

UEA:

- laboris por redukti strukturajn malegalecojn en internacia komunikado per promociado de lingva justeco;
- organizis tutmondajn kongresojn kaj virtualajn eventojn kun partopreno el diversaj sociekonomiaj kaj geografiaj kuntekstoj, inkluzive de pli ol 1 000 partoprenantoj el ĉirkaŭ 100 landoj en retaj formatoj;
- okazigis sian Universalan Kongreson de Esperanto en 2024 en Aruŝo, Tanzanio, plifortigante inkluzivon de subrepresentataj regionoj per rekta subteno al pli ol 300 afrikaj partoprenantoj;
- subtenis vundeblajn komunumojn pere de Konto Espero, helpante centojn da individuoj trafita de milito kaj naturaj katastrofoj en landoj kiel Demokratia Respubliko Kongo kaj Ukrainio;

- pere de sia tutmonda volontula reto disvastigis informojn pri UN-prioritatoj en Esperanto kaj tradukojn en dekoj da lingvoj, atingante komunumojn en pli ol 130 landoj.

Celo 16 por Daŭripova Evoluigo – Paco, Justeco kaj Fortaj Institucioj

UEA:

- antaŭenigis pacon, dialogon kaj homajn rajtojn per multlingva komunikado kaj interkulturaj iniciatoj;
- regule publikigis deklarojn okaze de internaciaj tagoj de UN, aparte pri paco kaj homaj rajtoj, kontribuante al tutmonda konsciiĝo kaj civitana engaĝiĝo en la Esperanto-komunumo tutmonde, kaj je loka kaj nacia nivelo;
- kreskigis reciprokan kompreniĝon trans lingvaj kaj kulturaj limoj per kultura programado, inkluzive de literaturaj konkursoj, publikaĵoj kaj prezentoj en Esperanto;
- subtenis sian Komisionon pri Virina Agado, unuigante virinojn el ĉiuj kontinentoj, subvencianta virinajn eventojn en Afriko kaj Eŭropo, kaj plifortigante inkluzivan partoprenon kaj genran egalecon.

Celo 17 por Daŭripova Evoluigo – Partnerecoj por la Celoj

UEA:

- plifortigis partnerecojn kun UN-organoj, NRO-oj kaj akademiaj institucioj;
- certigis plurflankan reprezentadon per siaj delegitaroj ĉe UN-sidejoj en Novjorko, Ĝenevo kaj Vieno;
- aktive laboris por starigi kunlaborajn rilatojn kun UN-Najrobo;
- plifortigis konsultajn rilatojn kun Unesko;
- partoprenis en la NRO-konferenco en Najrobo, la Ĝenerala Konferenco de Unesko kaj NRO-retoj;
- organizis flankajn eventojn kaj kontribuis al dialogo pri lingva politiko, lingvaj rajtoj kaj kultura diverseco;
- kunlaboris kun sia ĉina filio pri la Esperanto-eldono de la *Unesko-Kuriero*;
- subtenis tutmondan disvastigon de UN-informoj;
- servis kiel elektita estrarano de CoNGO, la Konferenco de NRO-oj en Konsulta Rilato kun UN;
- lanĉis la NRO-Komisionon de CoNGO pri Lingvoj kaj Lingvaĵo, per ĉeestaj kaj virtualaj kunvenoj;
- antaŭenigis edukadon pri la Celoj por Daŭripova Evoluigo per sia esperantlingva Gvidilo al Daŭripova Evoluigo;
- antaŭenigis median respondecon per sia Klimata Fondaĵo, kiu celas kompensi karbonajn emisiojn rilatajn al la agadoj de UEA.